






tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

novembro 2012 / n-ro 116



-  Eksa prezidento de Kroatio Stjepan Mesić kontribuas al Tempo
-  Zamenhof-tago festota en Varaždin, Bjelovar, Rijeka kaj Zagreb
-  Nova libro pri Tibor Sekelj de D-ro Sanja Lazarević k.a.
-  Fragmento el “Sekaj larmoj” de Mirko Božić en traduko de Roger Imbert

Ni veis en nia lasta rubriko **Karaj legantoj** en **Tempo** 115 pri la financa situacio de nia gazeto kaj demandis nin, ĉu aperos la venonta numero de **Tempo** 2012? Kaj jen ni denove!

Intervenis bona feo! La feo nomiĝas **Turisma Asocio de la Urbo Zagrebo** kiu subtenas nian asocion por rekandidatigo de **Zagrebo por Universala Kongreso de Esperanto** kaj kiu ĉi-numere komencas reklami **Zagrebon**. La subvencio trovis prezidantino **Judita Rey Hudeček**. Nia kolego **Ivan Špoljarec** preparis zagreban bukedon el diversaj motivoj dorsflanke de ĉi-numero de **Tempo**.

Pro la novaj kondiĉoj ni devis danki al nia multjara presisto **Josip Pleadin** kaj lia presejo **Grafokom en Đurđevac** kaj turni nin al zagreba presisto.

Ivan Špoljarec, kiu redaktis **Tempo** de la unua numero 1980, ĝis marto 1990 (kiam aperis la lasta numero de **Tempo** por 1989) ĉi-numere gastas kiel grafika redaktoro de **Tempo**.

Sur la titolpaĝo vi vidas la portreton de verkisto kaj esperantisto **Tibor Sekelj**, fotita de **Ivan Špoljarec**. **La jaro 2012 estas la jaro de 125-jariĝo de Esperanto kaj la jaro de Tibor Sekelj**. La jaro alproksimiĝas al sia fino. Al la temo de **Tibor Sekelj KEL** dediĉos la zagreban **Zamenhof-tagan feston**, kiu okazos la 19-an de decembro en **Etnografia muzeo**, inter la objektoj kiujn **Tibor Sekelj** dum sia vivo donacis al la muzeo. **Etnografia muzeo** eldonos okaze de nia **Zamenhof-tago** novan libron pri **Tibor Sekelj** verkita kroatlingve de **D-ro Sanja Lazarević**, kun kontribuoj de **Damodar Frlan** kaj **Spomenka Štimec**. La libro portas la titolon **Drugi ljudi i krajevi / Aliaj homoj kaj regionoj**. Ni atendas por la librolanĉo gastojn el la familio de **Tibor Sekelj**, **Erzsebet Sekelj (Hungario)** kaj **Ljiljana Sekelj (Serbio)**.

Zamenhof-tago estas multloke festata kiel tago de la esperanta kulturo kaj tago de la esperanta libro. Pli bonan partneron por la **Zamenhof-tago** ol **Etnografia muzeo** kun eksponaĵoj de esperantisto **Tibor Sekelj**, ni apenaŭ povus deziri.

Pluraj el niaj kluboj okazigas **Zamenhof-tagan feston** en decembro. **Bjelovara Esperantista Societo** invitas nin la 15-an de decembro 2012, la naskiĝtaga festo de **L.L. Zamenhof** al **Bjelovar**. Tie tri esperantaj societoj unuiĝis por krei festan **Zamenhof-tagan programon**. Krom la gastiganto **Bjelovara Esperantista Societo**, kiu invitas al laejo de **Česki Obec** en

Bjelovar, **Ul. Andrije Kačića Miošića** 28, kunorganizantoj estas **Dokumenta Esperanto-Centro** el **Đurđevac** kaj **Esperanto-Societo Estonteco** el **Križevci**. **Kroata Fervojista Esperanta Asocio** por siaj membroj kaj kunlaborantoj organizas transporton al **Bjelovar**. Por detaloj bonvolu kontakti prezidantinon **Marica Brletić**, marica.brletic@hzn.hr.

En **Esperanto-Klubo de Rijeka** oni festos la ĉi-jaran **Zamenhof-tagon** la 17-an de decembro je la 19a horo.

Janja Kelava okazigas en **Varaždina**, en la Urba biblioteko, fako por fremdlingva literaturo (Vila Bedeković, Str. A. Cesarca 10) okaze de **Zamenhof-tago** prelegon pri **Tibor Sekelj de Spomenka Štimec**, la 14-an de decembro.

Ni havas honoron gastigi sur la paĝoj de nia gazeto prelegon de la iama prezidento de **Kroatio Stjepan Mešić**, kiun li afablis permesi presi. Ni dankas al lia konsilanto **Tomislav Jakić** pro la perado de la peto. **Stjepan Mešić** prelegis en **Triesto** la 10-an de majo 2012, kadre de **Eŭropa konferenco** okazigita de **Eŭropa Esperanto-Unio**, kun gastiganto **Triesta Esperanto-Asocio**. Malofte ŝtatestroj partoprenas programojn okazigitajn de esperantistoj kaj kontribuas al iliaj gazetoj.

Spomenka Štimec pensiigis. La agado de **KEL** ekde oktobro 2012 disvolviĝas volontule. Pardonu se viaj demandoj ne estos respondataj tiel rapide kiel antaŭe.

La Prezidantaro de **KEL** kunsidis la 13-an de novembro 2012. La elektokomisiono (**Nedeljko Korasić, Marija Jerković, Spomenka Štimec**) elektis dum la kunsido la 17-a de oktobro 2012 la jenajn novajn membrojn en la Asembleo de **KEL**: **Anto Mlinar, Damir Mikuličić, Dalibor Šeatović, Faruk Islamović, Melanija Grgić**, elektitaj surbaze de 71 individuaj membroj de **KEL** en 2012.

Ni devas daŭre vivteni nian ejon en **Knez Mislav 11**. Konstatu ke la repago de niaj kreditoj en **Vodnikova**, atingis tiun gradon ke ekde oktobro 2012 **Vodnikova 9** finance subtenas la ejon de **Knez Mislav** per mil kunaĵoj monate. Bonvolu informigi pri **Vodnikova** aliantikole.

Esperanto-Societo el Sisak, kiu afablis inviti la **11-an kongreson de kroataj esperantistoj** dum la **10a kongreso de kroataj esperantistoj** en **Koprivnica** rezignis pri la facilanime donita invito. **Nataša Dorosulić**, la prezidantino de **Esperanto-Societo Sisak**

sendis al la prezidantaro de **Kroata Esperanto-Ligo** la leteron kun klarigo ke la kondiĉoj en **Sisak** ne maturas por gastigo de la kongreso en 2013.

Popola Universitato el Umag konsideras la inviton por aŭtuno 2013, sed detaloj ne ankoraŭ estas konataj.

En la pasinta tempo je informa kampo aparte aktivis nia membro **Dušan Adnadj** kiu gastis 3-fojojn por TV, du fojojn por **TV Vojvodina** kaj unu fojon por **HRT**. Pri liaj TV- kaj radio-elsendoj informis lia nepo **Luka**, ĉar **Dušan Adnadj** grave malsaniĝis.

Nia membro **Davor Grgat** estis honorigita de komunumo **Dugi Rat** kaj de la urbo **Omiš**, okaze de la respektivaj festotagoj de **Dugi Rat** kaj **Omiš** pro sia multjara kontribuo kiel kronikisto, ĵurnalisto kaj esperantisto. Post la honorigoj, li akcidentiĝis dum plukado de olivoj. Bonan resaniĝon al niaj aktivuloj! **Kroata verkisto Joža Horvat**, kunlaboranto de **Kroata Esperanto-Ligo** en **EU-projekto** 2008, mortis la 26-an de oktobro 2012 kaj ni adiaŭas de li ĉi-numere.

Du aliaj kroataj verkistoj kontribuas al **Tempo**: **Božica Brkan** per la titolpaĝo de sia nova libro **La kajkava legolibro** (en kiu aperis unu traduko de ŝia poemo el **Tempo**) kaj verkisto **Mirko Božić (1919-1995)** per la fragmento el la romano **Neisplakani / Neelplorintoj**, kiun tradukisto **Roger Imbert** preferis titoli **Sekaj larmoj**. (Kiel vicprezidanto de **Kroata Parlamento Mirko Božić** akceptis **Spomenka Štimec** en la **Kroata parlamento** kaj konsentis pri eldono de la romano en Esperanto. Tiu eldono neniam povis aperi. Nun realiĝas almenaŭ la parta konsento pri la apero de la verko. Dankon al **Michel Imbert** pro la permeso eldoni la fragmenton.)

Interliber estas la plej granda kroata librofoiro okazinta en Zagrebo de la 13a ĝis la 18a de novembro 2012. Al ĝi ni kontribuis ĉi-aŭtune per nova libro pri matematiko **Matematiko nia ĉiutaga** de nia vicprezidanto **Davor Klobučar**, lanĉita la 17-an de novembro. **Eldonejo Izvori** en sia budo ekspoziciis ankaŭ du librojn rilatantaj al Esperanto: **Zamenhof-Strato** de **Roman Dobrzyński** kaj la kroatan tradukon de **La vivo de Damoru** de **T. Mukhhopadhyay**, ambaŭ kroatigitaj el Esperanto de **Domagoj Vidović**.

Ĝis la baldaŭaj kristnaskaj kaj novjaraj bondeziroj en la decembra **Tempo!**

Spomenka Štimec

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare. Jaro XXIX, numero 116 (3/2012).

ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de **Turisma asocio de la urbo Zagrebo**.

Tempo aperas sone sur kompakdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas **Spomenka Štimec**.

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. (385 (1) 4617550, fakso (385 (1) 4619373,

esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr

Kontribuis: Ivo Borovečki, Božica Brkan, Mirko Božić, Ante Dabo, Davor Grgat, Antoaneta Klobučar, Davor Klobučar, Roger Imbert, Etsuo Miyoshi, Janja Kelava, Pjer Kosović, Goran Lakotić, Stjepan Mešić, Vjekoslav Morankić, Velimir Piškorec, Josip Pleadin, Krno Puškar, Judita Rey Hudeček, Vanja Radovanović, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar, Marija Toplak, Turisma asocio de la urbo Zagrebo.

Redaktoris **Spomenka Štimec**. **Grafike aranĝis**: Ivan Špoljarec. **Presis**: Urednik d.o.o., Zagreb

Anonctarifo: 1/1 paĝo 1000 kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj), lasta titolpaĝo 2500 kn (328 eŭroj). **Abono** por kvar numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭrojn. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭrojn.

Foto sur la titolpaĝo: **Tibor Sekelj (Vukovar, 1983)**, foto I. Špoljarec.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Prelego de Stjepan Mesić en Triesto

Sinjoro prezidanto, gesinjoroj, estimataj geamikoj,

Mi **ne estas esperantisto**, sed mi alparolas vin kiel **geamikojn**, ĉar tio kio estis ĉiam en mia koro: **paco kaj interkompreniĝo inter homoj kaj popoloj**, troviĝas ankaŭ en la fundamento de la ideo de universala lingvo Esperanto.

Ekzistas **simbolismo** en la fakto ke ni renkontiĝas unu tagon post tiu dato kiu tra la tuta Eŭropo estas prifestata duoblasence, kiel **Tago de la Venko en la Dua Mondmilito kaj ankaŭ kiel Tago de Eŭropo**. Tiu duobleco estas tre logika, ĉar **se ne estus venko super la naziismo kaj faŝismo** ĉu en ĝia originala eldono, ĉu en ĝiaj diversaj variaĵoj, **ne povus ekzisti la nuna Eŭropo**, kiu rapidpaŝe marŝas al la unuiĝo.

Kaj al la demando kiun vi prenis kiel kadran por via kunveno, nome – **kia estus Eŭropo sen Eŭropa Unio**, ni povus doni mallongan kaj klaran respondon: **malunueca, malforta, trakribrita per internaj kontraŭdiroj kaj grandparte sub dominado de, milde dirite, nedemokratiaj reĝimoj**. Eŭropa Unio kune kun ĉiuj propraj malfortecoj, kaj ĝuste nuntempe oni povas bone vidi ilin, **ĝuste tiu Eŭropa Unio prezentas kondiĉon por la nuna Eŭropo**.

Ekirante de miaj spertoj sur la pozicioj de la **lasta prezidanto de la Prezidantaro de Jugoslavio kaj de prezidanto de Respubliko Kroatio** dum plenaj 10 jaroj, mi elektis dividi kun vi pensojn pri tio, **ĉu la sudorienta Eŭropo havas alian alternativon krom Eŭropa Unio**. Kaj refoje mi povas respondi mallonge kaj klare: ĝi **ne havas**, sed mi opinias ke tiu ĉi respondo postulas iom pli da klarigoj.

Ĉi tie antaŭ ĉio mi ekiras de la **karaktero de Eŭropa Unio**, de tio kio **ĝi devus esti**, kaj tio estas, almenaŭ en tiu ĉi fazo – unuiĝo de suverenaj ŝtatoj, kiu establos tian **gradon da integriĝo kaj tian kvaliton de iliaj reciprokaj rilatoj ke nenia milito plu eblos sur la malnova kontinento**. Alivorte: **Eŭropa Unio transformas Eŭropon al kontinento de la paco**, kaj tio estas por ni, ŝtatoj ekestintaj sur la teritorio de eksa Jugoslavio, **escepte grava**.

Mi verŝajne ne devas vin memorigi pri la fakto ke la plimulto de novaj ŝtatoj en la sudoriento de Eŭropo estas **naskita en milito aŭ defendita en milito**. Oni scias kiu estis **atakinto**, kiu **instigis la internajn malpacojn** por povi aperi en la rolo de la defendanto de la propra nacio, respektive minoritato, per glavo en la mano, kaj oni scias ankaŭ kiu sin **defendis** kvankam ankaŭ en la flanko de defendantoj okazis krimoj.

Pura estas neniuj, sed kiu atakis kaj kiu sin defendis, pri tio ne povas esti diskuto.

Bone mi memoras kiel en la tempo kiam mi estis **prezidanto de la Prezidantaro de Jugoslavio** mi vizitadis, ĉu oficiale ĉu neoficiale, mondajn ĉefurbojn kun ununura mesaĝo por miaj kunparolantoj: **faru ion, oni preparas militon, ĝi estos sangoplena kaj kruela**, sed tion eblas malhelpi delegante simbolajn pacfortojn sur la limojn inter Kroatio kaj Serbio, respektive inter Bosnio-Hercegovino kaj Serbio.



Stjepan Mesić, la eksa prezidanto de Kroatio, prezentis en Triesto la 10an de majo 2012 dum la eŭropa konferenco la prelegon, kies tekston kun lia afabla permeso ni publikigas ĉi-tie.

Fotis Zlatko Tišljar

Ĉie oni priaŭskultis min, ĉe iuj ne estis malfacile rimarki ke ili ne kredas min, sed same tiuj kiuj kredis al miaj nigraj prognozoj kiel tiuj kiuj ne kredis, **unuece respondis al mi: bedaŭrinde ni povas fari nenion**. Dum ne ekzistas vera konflikto, ne povas esti iu ajn interveno. Kaj sekvis tio kio okazis kaj la **respondeco de la internacia komunumo por la disfalo de Jugoslavio estas senduba**. Nek Unuiĝintaj Nacioj nek Eŭropa Unio havis mekanismojn por malhelpi tion kio estis okazonta. Kaj mi diras ankoraŭfoje, **okazis tio kio okazis**.

Nuntempe tiu tempo estas **du jardekojn malantaŭ ni**. Nuntempe sur la teritorio de eksa Jugoslavio ekzistas **sendependaj ŝtatoj** en la limoj kiuj korespondas al la limoj de la iamaj respublikoj – federaciaj unuoj, respektive: kaze de Kosovo, en la limoj de iama aŭtonomia regiono, kiu same estis konstitua parto de la federacio.

Kaj nuntempe, **ĝuste nuntempe**, stariĝas la demando **kiel ordigi la reciprokajn rilatojn de tiuj ŝtatoj kaj kiel plani ilian vojon al Eŭropa Unio**, konsiderante tion ke Slovenio jam estas membro de Eŭropa Unio kaj Kroatio estas antaŭ ties pordo.

Kial tiu ĉi demando estas tiom grava? Pro simpla kaŭzo: **La militoj en eksa Jugoslavio ekestis ne pro tio ke la popoloj reciproke malamis sin**, sed tamen ekestis militoj en kiuj okazis teruraj krimoj en ĉiuj flankoj, forpeloj de tutaj popolgrupoj, amasaj perfortoj, kaj **pro la militoj ekestis malamo** kiun parto de politikistoj kaj medioj ree ĉe ĉiuj flankoj plu disflagras.

La **nura kadro** kiu povas helpi ke ni **malkreskigu tiun malamon** estas afirmado de la **valoroj kiaj tolero, estimo de diferencoj samkiel afirmi la neceson pri kunvivado** - ne en iu nova Jugoslavio, sed en unuiĝinta Eŭropo – tio estas en Eŭropa Unio. Do, **nur Eŭropa Unio**.

Kiel prezidanto de respubliko Kroatio mi konsekvence agis por starigi **regionan kunlaboron**, kio antaŭ mia poziciigo pinte de la ŝtato estis kiel nocio tabua temo. **Kun Slovenio la aferoj evoluis glate** ĝis ni atingis iujn problemojn kiuj tute ne devus iĝi problemoj kaj kiujn – mi kredas – ni nun solvos **dank' ĝuste al la Unio**.

En **Bosnio kaj Hercegovino** kiun mia antaŭulo volis disdividi kun Slobodan Milošević, necesis unue disvaporigi la pravigeblajn kaj kompreneblajn dubojn, necesis proklami klaran politikon de **malakcepto de kiu ajn teritoria pretendo, ne rezignante samtempe pri la zorgo por kroatoj vivantaj en tiu ŝtato**. Ankaŭ tie ni efektiviĝis signifajn paŝojn, sed pro la neefikeco de Bosnio kaj Hercegovino kiel ŝtato **ni daŭre marŝas samloke**.

Kun **Serbio** necesis efektive starti de komenco, sed sub unu **grava kondiĉo**, kiu je la kroata flanko estas grandparte plenumita, kvankam ne ĝisfine, sed je la serba flanko **tute ne ankoraŭ**. Tiu antaŭkondiĉo estas **konfrontiĝo kun la vero pri la pasinteco**. Bedaŭrinde, la pasinteco, ĉu la plej freŝa ĉu tiu iom pli antaŭa, estas **senskrupule utiligata kiel aduto en antaŭbalotaj kolizioj** en kiuj ree kaj ree oni svingas la flagojn de naciismo kaj reciproka maltolero.

La nura **kadro en kiu tio ne estos al ni permesita estas Eŭropa Unio**, eĉ se – mi devas tion diri – la **Unio mem ne estas imuna je naciismoj** kaj des mapli rilate okulfermon antaŭ la naciismoj kaj ties negativaj konsekvencoj.

Tamen, la **Unio baziĝas je la ideo de malfermitaj limoj, libera fluo de homoj, kapitalo kaj ideoj kaj je diferencriĉo**. Mi scias, ekzistas lastatempe tiusence iuj **nekonsekvencecoj**, ekzistas **ŝanceliĝoj**, sed mi tutsimple malakceptas kredi pri la eblo ke iu, **iu ajn**, estus preta oferi ne nur altajn idealojn kiuj troviĝas en la fundamento de la Unio sed eĉ **ĉion kion en praktiko oni jam realigis**.

La konjektoj pri la refortiĝado de naciismaj elementoj koste por, pli precize, damaĝe por komunaj eŭropaj interesoj, estas **preterpasa fenomeno kiu ekestas pro la manko de vizio konfrontiĝante kun la krizo kontraŭ kiu la Unio luktas**. Ni devas kompreni ke la krizon ni povas **solvadi kaj solvi nur komune**, neniam unuope, kaj eĉ malpli je la kosto de aliaj. **La krizo estas tutgloba, en ĉi tiu kazo tuteŭropa**.

La solvo nek estas nek povas esti tia ke oni traktu unuope ĉiun landon kiu momente estas akute **endanĝerigita**. Simile oni faris en la tempo de la disfalo de Jugoslavio. Neniu havis forton okupiĝi per la krizo en ĝia **tuto, detekti ties verajn kaŭzojn** kaj montri la vojon sur kiu eblus eliri el ĝi. Anstataŭe la mondo unue okupiĝis pri Slovenio, poste pri Kroatio, tiam Bosnio-Hercegovino. **Centmiloj da homoj pagis per la vivoj tian solvoaliron. Jes: centmiloj**.

Por ni en la sudoriento de Eŭropo, ankoraŭ signifaj per la vundoj kaj lezoj, **rilate Eŭropan Union kiu ofertas komunecon en egalrajteco konsiderante la diversecojn, vere ne estas alternativo kaj ankaŭ ne povas esti**. Kaj ju pli frue ni ĉiuj estos en Eŭropa Unio des pli bone. Kompreneble mi ne opinias ke iu ajn devus havi privilegiojn. Ni ĉiuj devas plenumi ĉiujn postulatajn **kriteriojn**, akcepti la samajn **principojn**, harmoniigi niajn naciajn leĝarojn kun la komunan akiraĵojn de Eŭropa Unio por ke **ni ĉiuj same pretaj, kvankam en diversa tempo, eniru Eŭropan Union**.

En tiu Unio **senkonsidere pri la limoj**, ĉiu popolo vivos en komuneco de sia kultura korpuso. Kaj la sloganoj kiuj dum la tempo de jugoslavia disfalo havis **mortigan efikon**, nome ke unu popolo devas **komplete vivi en unusama ŝtato, perdos ĉiun sencon**.

Mi diras unu plian fojon: **ju pli frue tio okazos, des pli bone**. La **intereso de Kroatio certe ne estas ke inter ĝi kaj ĝiaj najbaroj kresku fera Shengenkurteno**. En la Unio ni povos daŭrigi kaj **ankaŭ ni devos** – pro la Unio – la proceson de normaligo de niaj reciprokaj rilatoj, proceson de rea starigo de reciproka fido kaj kompreniĝado. **La Unio simple devigos nin ke niajn najbarojn ni vidu kaj akceptu egalaj al ni senkonsidere pri tio kiom diferencaj ili estas**.

Jen, tio estas ŝlosilaj kaŭzoj pro kiuj **mi ekstremdicide diras ke por la landoj de sudorienta Eŭropo ne estas alternativo koncerne Eŭropan Union**. Mi iom vastigu la aserton kaj diru: **Ankaŭ Eŭropo ne havas alternativon krom pluevoluigi Eŭropan Union**, sed estas evidente ke en certaj ŝlosilaj punktoj estas necesa **redifino de la Unio**.

Sed tio jam eliras el la kadro de mia temo kaj ĉi tie mi haltos krom unu nura rimarko: eble al iu ŝajnos ke mi estas **tro granda idealisto, eble eĉ utopiisto**. Sed memoru kia ŝajnis la ideo de unuiĝinta Eŭropo en la tempo kiam oni kreis Komunajn por Karbo kaj Ŝtalo!

Fine ankaŭ la lingvo, kiu nin kunigis ĉi tie – **Esperanto** – al multaj ŝajnas ankaŭ nuntempe utopio. **Sed ĝi vivas, eĉ longe**. Estas nemulte konate ke granda kroata politikisto Stjepan Radić kiel ministro en Reĝlando Jugoslavio intencis enkonduki esperanton kiel **devigan lernobjekton** en lernejoj. **Damaĝe ke li tion ne faris**, samkiel estas damaĝo ke ankoraŭ nuntempe ekzistaj tiuj kiuj dubas pri valoro de Eŭropa Unio.

Mi ne dubas, kaj mi ŝatus ke ankaŭ Esperanto trovu sian lokon en ties institucioj.

Dankon ke vi aŭskultis min.

Eksprezidanto de Kroatio: **Stjepan Mesić**
Triesto, la 10-an de majo 2012
Esperantigis Zlatko Tišljár



Sur la foto de Forumo pri la paco en Triesto de maldekstre: Thomas Jansen (la iama ĝen. Sekretario de Popolaj partioj en Eŭropa Parlamento), Zlatko Tišljár, Milan Kučan (la iama prezidanto de Slovenio), Gianni de Michelis (la iama ministro de eksteraj aferoj de Italio), Giorgio Rossetti (la iama eŭropa parlamentano el Italio) kiel gvidanto de la La Forumo, Stjepan Mesić (la iama prezidanto de Kroatio) kun Nikola Rašić, tradukinto el la kroata kaj slovena). *Fotis Petro Balázs*

Zamenhof-Tago en Kroatio

(Tago de esperanta kulturo)

Varaždin	Gradska knjižnica “M. Ožegović” - Odjel strane literature A. Cesarca 10	14.12. – 19 h
Bjelovar	Gradska knjižnica “P. Preradović” poste Češka Obec , Ul. Andrije Kačića Miošića 28	15.12. – ekde 9.30 h
Rijeka	Esperanto-Klubo , Ul. Blaža Polića 2	17.12. – 18 h
Zagreb	Etnografski muzej , Mažuranićev trg 14	19.12. – 19 h

Pluvoza kaj kaŝtanoza MKR en Lovran



Jam dum pli ol unu jardeko MKR (MontKabana Renkontiĝo) sinsekve venigas montaremulojn al altaj slovenaj Alpoj kaj malpli altaj, sed ankaŭ tre interesaj, kroataj montoj. Estas granda ĝuo por ĉiuj surgrimpi altajn, pli ol dumilmetrajn alpajn montojn, sed eble eĉ pli granda estas rigardi maron de niaj kroataj apudmaraj montoj.

Pasintjare MKR venigis siajn partoprenantojn al belega pinto Stol je aŭstro-slovena limo kie fine de septembro regis belega, kvazaŭ somera vetero. Dum migrado ni sunumis en ĉemizoj kuŝante sur 2236-metra pinto. Kaj ĉi jara MKR okazis tri semajnoj pli poste, inter 11-a kaj 14-a de oktobro, sed ĉe marbordo (la ejo estis nur 50 metroj for de la maro!), en nordadriatika

urbeto Lovran en Kroatio, kaj ĉiuj esperis ke la vetero estos almenaŭ sambela... Bedaŭrinde, tio tamen ne realiĝis. Antaŭ MKR la vetero estis belega, post ĝi eĉ pli bela ...sed, dum la aranĝo pluvis ofte kaj la ekskursoj, al plej alta pinto de Istrio, Učka (1401 m), kaj interesa roka pinto Sisol (835 m), ne estis tiel agrablaj. Ŝuoj estis plenaj da akvo, pantalonoj malsekaj... kaj la maron ni tute ne vidis de la nebulplenaj pintoj.

Sed, MKR tamen havis siajn brilajn momentojn: la loĝado estis plej luksa en ĉiuj 23 jaroj de la aranĝo, kun hotela vivnivelo kaj nepriskribebla bela rigardo al la golfo de Rijeka kaj najbaraj insuloj. Krome, spite al ŝanĝiĝema vetero, la marakvo ankoraŭ estis varma, 21 grado, kaj la partoprenantoj uzis la eblecon naĝi. Aldone, samtempe kun MKR en Lovran okazis tradicia festo «Marunada», festo de kaŝtanoj. Komence de oktobro loĝantoj de Lovran kaj la ĉirkauaĵo rikoltas kaŝtanojn kaj preparas el ili bongustajn kukojn kaj la tuta festo estas kompreneble aranĝita kun multe da muziko, vintrinkado kaj ĝenerala festema etoso.

Ĉi jaran MKR-on partoprenis 33 partoprenantoj el 8 landoj kaj organizantojn speciale ĝojigis la fakto ke ĉi jare estis pli multe da gastoj el pli foraj landoj: Ruslando, Svedio, Germanio. MKR ja estas nur 4-taga aranĝo, ekde ĵaudo ĝis dimanĉo, kaj ne indas longe vojaĝi por tiel mallonga restado - sed, ĉiam eblas organizi la vojaĝon tiel ke oni aldone vizitu ankaŭ aliajn interesajn de la regiono kaj lokajn esperantistojn.

Vanja Radovanović

Monato de la libro en Križevci

La 15-an de oktobro 2012 en la kela salono de Kroata hejmo en **Križevci** prelegis **Nada Kušić**, direktorino de la Biblioteko kaj legejo **Vrbovec** pri **Josip Velebit – grava kroata esperantisto**. La programon okazigis Urba biblioteko **Franjo Marković Križevci**.

Ekspozicio de diversaj dokumentoj pri la esperantlingva kaj kroata poeto **Josip Velebit** estis prezentita. La programo omaĝis al la jubileo de la centjariĝo de **Velebit**, festita en liaj loĝlokoj **Zaprešić** kaj **Vrbovec** en 2011.

Kruno Puškar, prezidanto de **Esperanto-Societo Estonteco Križevci** prezentis Esperanton kaj disdonis diplomojn al la kursanoj kiuj partoprenis julian programon en la biblioteko, okazinta sub la titolo **Esperanto kaj lingva egaleco**.

Judita Rey Hudeček, prezidantino de **Kroata Esperanto-Ligo** partoprenis en la solenaĵo.

Kruno Puškar

Vicprezidanto de KEL, 50-jara matematikisto Davor Klobuĉar el la urbo Osijek publikigis ĉe la eldonejo Element d.o.o sian 730-paĝan libron "Matematiko nia ĉiutaga" (kroatlingve).

La libro kondukas la leganton tra multaj partoj de matematiko kaj donas multe da utilaj informoj. Uzebla por ĉiuj kiuj ŝatas matematikon, kaj aĝas inter 17 kaj 77. Kvankam "plensange" matematika libro, ĝi tamen estas plena de humuro kaj rakontoj.

Krom la tre elstaraj sponsoroj (fakultatoj kaj lokaj ŝtataj institucioj el Osijek), la libron kunfinancis ankaŭ Esperanto Societo Rijeka. La aŭtoro enmetis en la libron kelkajn menciojn pri Esperanto. En la kolofona paĝo estas menciita la esperanta sponsoro kaj supre metita slogano "Matematiko estas reĝino de l' sciencoj" en 3 lingvoj (kroate, latine, esperante). Sur la lasta kovrilpaĝo en la aŭtoro biografieto legeblas, ke li estas multjara aktiva membro de Kroata Esperanto-Ligo. Kaj en diversaj lokoj interne de la libro menciigas nia lingvo eĉ trifoje.

Dum la lanĉo ĉe la plej fama kroata librofoiro "Interliber" la 17an de novembro en Zagreb oni povis aŭdi plurajn prezentantojn de tiu ĉi libro, sed ni elektu la edzinon de la aŭtoro. Ŝi mem estas universitata profesoro pri matematiko!


"Mi plene konsentas kun aliaj prezentantoj, ke estas ekstreme malfacile komenti matematikan libron el 700 paĝoj plenaj de materialo tre diversspeca, al kiu apartenas nombroj, geometrio, algebro, aro-teorio, kombinatoriko, grafiteorio, matematika analizo, mezurado, cerbumaj rakontoj ktp.

Mi kredas, pli interese estos, se mi, edzino de la aŭtoro, malkovros kiel la libro naskiĝis.

La komenco estis en la fora pasinto, kiam li frekventis la okan klason de elementa lernejo. Li kolektis interesajn matematikajn taskojn kaj skribis ilin en sian etan bluan notlibron. Tiam li partoprenis kroatian matematikan konkurson por lernantoj kaj vane klopodis solvi iun problemon pri medianoj de triangulo. Kaj nun tiu problemo estas en la libro.

En mezlernejo li notis ĉiam pli komplikajn problemojn kaj faktojn. Sed en sia studenta aĝo li ĉesis fari tion. Nur kiam la filino ekstudis la saman fakon - matematikon - en la sama fakultato, li rememoris siajn notlibrojn kaj enkomputiligis ilin. Estis tio kerno de ĉi libro.

Kaj tiam li jam tre avide kolektis novajn materialojn, preskaŭ ĉiun tagon dum 2 jaroj. La fontoj estis interreto, libroj kaj ĉio kion li sukcesis kapti. Eĉ el studentaj kajeroj de la filino li prenis



kelkajn problemojn. Ekz. tiun pri fabelaj estaĵoj - Neĝulino kaj sep nanoj, Dormanta Belulino, Joĉjo kaj Marinjo, la sorĉistino kaj la princo. Sub certaj kondiĉoj, oni povas vicigi ilin ĉirkaŭ ronda tablo, sed je kiom da manieroj?

Tiel do, iom post iom, aperis tiu ĉi libro.

Ali mi, matematika profesoro, plaĉas tio, ke multaj komplikaj aferoj estas en ĝi klarigitaj tiel, ke ili ĉesas esti komplikaj.

En la teksto estas multe da nekutimaj ekzemploj kaj malofte menciataj faktoj, kiujn oni povas bele apliki en instruado de matematiko. Ĉefe en mezaj lernejoj, sed foje eĉ en universitatoj.

Krome, la libro montras ke matematiko, kutime tre serioza kaj severa, povas esti ankaŭ gaja, eĉ humurplena. Legante la tekston, kelkfoje mi ridegis elkore. Krom la teksto, spritaj estas ankaŭ la ilustraĵoj. Ekz. la eta azeno kiu havas problemojn kun kalkulado, aŭ la fabelaj nanoj, portantaj al sia laboro ne pioĉojn kaj ŝovelilojn, sed liniilojn kaj cirkelojn.

Pro ĉio ĉi la libro al mi plaĉas, kaj mi kredas, ke ĝi helpas al popularigo de matematiko en nia lando.

Antoaneta Klobuĉar
(Esperantigis Davor Klobuĉar)

Kroataj pupoj en Japanio

La 2a Monda Pupekspozicio okazis en la japana urbo **Higashikagawa** inter la 29a de septembro kaj la 8a de oktobro. Ĉijare estis reprezentataj 41 landoj per 700 pupoj faritaj el metalo, papero, maizaj folioj, ligno, porcelano, ŝtofo kaj plasto. La tuta kolekto estis farita danke al la kunlaboro de esperantistoj. Elstare menciendas, ke la uzbeka registaro sendis 10 aŭtentikajn marionetojn, speciale faritaj por ĉi - evento.

Tre aprezataj estis la vestaĵoj de la laosaj pupoj, la marioneto el **Mianmaro**, la mongolaj ĉevalistoj kaj indiĝenoj el **Kanado**. Ankaŭ japanaj pupoj estis montritaj en 20 hejmoj ĉirkaŭ la ĉefa ekspoziciejo. Kroatio estis prezentita per pupoj kiujn en Sisak produktis pupkreatino **Vera Vuksanović** kaj kiujn la organizanto de la ekspozicio aĉetis por la bezooj de la ekspozicio. La pupo kreita en **Sisak**, vestita per la tradicia kostumo, ornamas la ĉi-jaran afiŝon de la japana pupfesto.

Plia ero en la programo estis parado kun 200 diverslandaj kostumoj, pupa kabuko, pupteatraĵo, ateliero pri farado de pupoj el japana papero. La lokaj manĝejoj servis pladojn el **Eŭropo**, **Usono** kaj **Azio**.

La amaskomunikiloj subtenis la aranĝon per aperigo de 7 artikoloj en 5 lokaj kaj regionaj ĵurnaloj; plie 1 radia kaj 5 televidaj stacioj informis 6-foje pri la evento. Rimarkinde estas, ke la konata TV-kanalo NHK faris 2-foje rektajn elsendojn, kiuj tiel efikis, ke la publiko kelkmilobliĝis.



Ni nun kovas la planon por la venontjara ekspozicio kun pli bunta reprezentantaro, diversspecaj teatraĵoj kaj opero.

Bonvenon al la la 3a Monda Pupekspozicio en 2013 en Higashikagawa!

E. Miyoshi

Tempo gastas en Kajkava legolibro



La bela desegnaĵo de **Jenio Vukelić** ornamas la titolpaĝon de la nova libro de la kroata ĵurnalisto kaj verkistino **Božica Brkan**, titolita **La kajkava legolibro**. La impona verko aperis ĉe la eldonejo **Acumen**.

Božica Brkan estas elstara poetino kies esprimlingvo en tiu ĉi enciklopedieska verko estas la kajkava dialekto de la kroata. Unu paĝo de la impona verko **La kajkava legolibro** gastigis - paĝon de **Tempo** el la numero 107 de la jaro 2010. Temas pri la traduko de la poemo de **Božica Brkan En la nokto**. La poemon tradukis **Spomenka Štimec**.

S.Š.

Mirko Božić

SEKAJ LARMOJ

Neisplakani
(Romano)

I-a ĉapitro

Sur malalta trepiedo ligna, nigra plado, kaj sur ĝi zorgege elrodita de la vosto ĝis la kapo, disrompita skeleto de truto. Unu okulo elsuĉita, en la mallumo ĝia orbito eloscedas, kaj sur la malklara fridaĵo de la okulo vibras la ruĝeta lumo de la dika ardŝtupo, kiu jam frostotime kovriĝas per la prujno de l' cindroj kvazaŭ per varmaj eriĝemaj skvamoj.

La refulman facon de la morta fiŝokulo algapis longkrura malgrasa homo. Komence li dormeme miris ĉar nek li nek iu el liaj naŭ familianoj ĝin elsorbis kaj tiam li pense forvagis: eble la fiŝo en tiu okulo konservis sian venĝredonon... Ankaŭ posttagmeze, la rivero, kiam li enpuŝis sian terplenon polekson en la fajnan reteskan fendaĵon sub la blankoj, li dum momento vidis kvazaŭ la samon en ĝiaj fiksrigardaj pupiloj ŝvelintaj pro la neaŭdebla doloro de stertoro.

Tiam la viron denove trapinglas ia funebra, vertebrata pikjuko, sed ĉifoje inundita de l' memoro.

Li staris kubute apogita al la kapfino de la abiaĵa lito en kiu koagule raŭkis la kveradoj de la surflanke lapkroĉaj infanoj.

En la ĉambreto eksusuras la foliaro, kie iame muĝis la bovo. Nun sole siblis tra la malfermitaj lukoj la rapidigita murmuro de la pluvo kiu gute bekadis – kvazaŭ flugistaro da ĉielaj bluaj nudkoluloj la sablerojn en la kanaletoj sub la malalta larmkornico. La laneca bukloro de la sterniĝinta fumo lante distreniĝis en la humidigita ŝtona areo.

La viro plue gapis al la okulo sur la fiŝa ostamaso. Nun li nenion plu antaŭsentis, sed li estis en si mem sarkasme praviganta la mergintan projekton. Delonge li veneniĝis de tiu projekto samkiel tiu fiŝo per balukoto.

Ĉiam tiu interna malplektado lin allogas per sia duobla malracio: per la mordsevera fortimpeto de la malsat-eksciteblo kaj la magnetsorĉa pan-bonflaraĵo. Kvazaŭ krevfuĝus la tero sub liaj gamboj: formikigas lin la nesekureco de la defendo kaj samtempe lin malpezigas, senzorgigas lin la estonta ĝugrasa fruktmatuĝeco de lia vizaĝo kaj li volas pro ĝi esti trompata. Ĉu ne estas ĉio

ĉi nur espero, sento poreca kaj ĝememe priruza? Lia vivo priokulas forĝe per nesatigeblaj truoj kvazaŭ spongo. Pruntepreni lin erete sorbigus. Prunto estas espero. Sed la spongon oni eltordas per manpremo, (per la polekso oni enpremas la brakojn) kaj ĝi ekflosas denove leĝera, seka kaj aeroza, plenplena je nigraj kavaĵoj, subokulaj bluŝvelaĵoj kaj raŭka kverado.

Kiu ajn estu la espero, necesas amiki kun li, pensis la viro. Ne estas amikeco sen risko ĝin perdi, same ne espero sen provo akiri amikecon. Kaj espero kaj amiko plej ofte estas raraj, lantaj kaj misaŭguraj, sed sen ili la homoj estus ankoraŭ pli grave surprizitaj de la plagoj. Li kliniĝas antaŭ ili bonvoleme kaj solene, kvankam ili eble estas la komenco de senespero kaj malamikeco, ĉar ĉiel neniun komencon oni povas malhelpi.

La verega neceso pruntepreni kaj la malfeliĉa ŝanco por aĉeti, kaj de ambaŭ la timo kiel ankaŭ de la postaj, fastaj tagoj, pensas la viro. La necesoj kaj la ŝancoj, reteskaj fadenoj, je kiuj kroĉiĝas la vivo. Se rompiĝas tiuj fatalaj fadenoj, la vivoj ekputras kiel kadavroj kaj glacieco briligas ilian okulon. Ŝancoj kaj necesoj! Rondŝvebas fiaŭguraj affliktintoj, rondŝvebas kornicoj nigrasignaj, rondŝvebas la kosmo kapriolega, kaj la homo interplektas pro siaj etaj gamboj tiujn retojn kaj iel li sur la tero pasas. Mateniĝas.

La frido ekparalizas liajn ŝultrojn kaj disverŝiĝas laŭ liaj membroj. Li trovas sin bulŝrumpa sur la junkmato, kun malmola subkapaĵo kvazaŭ li ŝutiĝus de la tegmento kune kun la junkaĵa tufo.

La vila kapeto de la plej juna debalanciĝis el la lito kaj pendis iomon super la planko kvazaŭ ĉe buĉita ŝafido. La viro subprenis ĝin per la maldekstra polmo kaj enigis ĝin retere en la neston de la kovitaro, kvazaŭ forkaresante malkvietan faskon de la haroj.

Nun ŝi leviĝus – se ŝi estus viva – kaj ŝi trarapidus la domon: en unu momento ŝi stangekscitus la palan ardaĵon, ektintus la kupropoto, bolus la densa kaĉo, muĝvokus la bovo, ŝprucus la gaja infanploro. Kaj ŝi timeme rigardus lin. Ŝi ne volus ke li antaŭe jam ĵetu la tutan kulpon al si mem, ŝi duonigus la zorgoplenon, kaj tiun planon taŭgan al la virina naturo ŝi konsiderus sia, la langon ŝi retirus de sur sia zorga nepripensemo kaj instigus lian bonintencan projektadon. Ŝi silentus kompreneble, tuta je siaj laboroj, sed li ĉion ĉi pruntlegus el ŝiaj okuloj por sia pravigo. “Vi scias ke tio estas malbona kaj

tamen vi instigis min. Facile vi rakontos nun ke vi antaŭe timtremis. Ne ĵuru je la infanoj!, Loko ne estis, li devis foriri? Ho, virina abrupteco! Ĉu vi redonos al li, ĉu vi...“

La domo batdoloris sub la surda respondo.

Sed tamen estas pli facile al li, kvazaŭ post senspiriga kverelo. Jen, eble estis jam fatdecidite, ke ĝuste tiun vintran matenon naskiĝos lia tortura elpenaĵo, li konsolis sin alstreĉante siajn diskraĉajn ŝuegojn.

– Iglica, ekscitu la fajron, por ke la infanoj varmiĝu – li diras al knabineto kun lakteca vizaĝo, fulgetita de la lastvespera fumo.

– Mi iras serĉi iun ajnaĵon... - li daŭrigas al ŝi per la ĉiutaga espero.

Ĝuste kiel sur la laktosulkoza kremsupraĵo, faltiĝas sur la vizaĝo de la etulino rideta tremondo, ĉu pro la humida frido, ĉu pro la kutime senfrukta promeso de la patro.

Ŝi rapidmove leviĝas, paŝadas iomete sur siaj nudaj, fragilaj piedoj, kaj tiam ekkaŭras ĉe la kameno kaj fosesploras la lignocindron per la manoj. Ŝi surĵetas sekajn foliojn sur la kovbrulantan blankan ardaĵon kaj blovas per malforta spiro. Ekplektiĝas fuma fadeno kaj ŝi tiam vestas sin.

Ŝi dormis ankoraŭ kun la infanoj, kvankam ŝiaj femuroj ekhumidiĝis kaj ŝiaj koksoj iomete oscedis kiel glaveskaj folioj ĉirkaŭ la blueta ovario de irido.

Ŝi havis infanecajn vestĉifonojn franĝitaj de ekburĝonintaj mamoj kvazaŭ de adaptitaj ŝildaj ŝtofflikaĵoj, kaj helbluajn migdaleskajn okulojn, honte virinetajn.

Sed la homo ne rigardas al floro kiam li pensas pri la panero.

Tiam ekiru jam ĉipaŝe kaj alportu al ili kion ajn!

Li turniĝas, paŝas, malfermas la pordon: la glacia aero skurĝas lin pluvgute kvazaŭ per franĝa vipo. Li fermetas la pordon, elblovas en la mankavojn. Li volis ekpreni la kapuĉan pluvmantelon, tristan signon, enterigan odoron, surdan ĝemon. Al la espero necesas aliri kun dissternitaj manoj kaj serena koro, tiel kiel iam Gavran la aventurema sciis disflagrigi sian alverŝan ridon. En la mizero necesas akiri amikon per sia amikeco. Bonvolema, kora kaj serena estu cia aspekto. Nenian signon krom serena vizaĝo kaj malmultaj vortoj, ĉar la homoj ne estas malbonaj se oni aliras ilin kun serena vizaĝo kaj malmultaj vortoj.

Ankoraŭfoje li entrinkas spire la humidecon de la ŝtona hejtejo kaj turnas la rigardon al la disbrulanta fajrejo kaj al la vaka kroĉstango.

Iglica sidiĝas sur la trepiedon kaj sorbas la malvarman okulon de la truto. Ŝi ĉirkaŭlekis poste du fingrojn kaj ĵetis tra la fenestro la fiŝrubaĵon.

La viro eliras.

La maldensaj pluvdornoj sparkis oblikve kaj iam tiam fingroŝmacis lian malhelan vizaĝon.

Esperantigis Roger Imbert

Noto:

La verko neniam estis eldonita. Eĉ pli, perdiĝis la manuskripto de la traduko de Roger Imbert. Tempo publikigas ĉapitron trovitan en nia arkivo (Bulteno de SEK, N-ro 1-2/1964).

Poezio

**„Eble iu rememoras
vian kanton dum roz' floras?!“**

**Ĉarma tago ekaperas
„oranĝe l'eost' elstaras“,
ĝojon la okul' generas
sed kor' mia pli amaras.**

**Jen denove sun' varmigas,
sur la strando laro nestas,
preskaŭ ĉio kiel iam,
nure Vi de mi forestas...**

**Eble iu rememoras
Vian kanton dum' roz' floras?!**

*Ante Dabo
(El la kroata Ivo Borovečki)*

Helpo al KEL

KEL ricevis malpli grandan subvencion en 2012 ol en la antaŭaj jaroj kaj havas financajn malfacilaĵojn samkiel multaj firmaoj kaj asocioj ĉirkaŭ ni. Tio signifas ke necesas pligrandigi nian helpon al KEL.

La estraro de KEL dum sia kunsido akceptis decidon malrapidigi la repagojn de kreditoj al Vodnikova 9, por ke el la lupagoj en Vodnikova 9 oni financu la ejon de Kroata Esperanto-Ligo en Knez Mislav 11 per 1000 kn monate.

La kreditoroj konsentis pri tiu propono por helpi al la agado de KEL. La unuan fojon en la 9-jara historio la ejo Vodnikova 9 finance helpas al la ejo Knez Mislav 11!

Multaj unuopuloj helpas en 2012 diversmaniere por ke nia oficejo funkciiu:

1. Judita Rey Hudeček (benzinmono) 300,00 kn
 2. Neven Kovačić (helpo por administra helpanto Tihana) 3000,00 kn
 3. Radenko Milošević (inko por printilo) 150,00 kn
 4. Neven Kovačić (donaco de mebloj) 2000,00 kn
 5. Boris Di Čoŝtanzo (donaco de libroŝranko kaj muntado) 2000,00 kn
 6. Spomenka Štimec (urba transportkosto) 400,00 kn
 7. Zlatko Tišljarić/por Esperanto-Soceto „Tibor Sekelj“ (por elektrokosto) 200,00 kn
 8. Mladenka Đaković/por Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ (por gaskosto) 200,00 kn
 9. Neven Kovačić (por purigistino) 400,00 kn
- Sume: 8650 kn

Multaj homoj kontribuis per sia libera tempo, ideo, sperto, konsilo. Kiel helpis vi?
Al ĉiuj tre koran dankon.

S.Š.

Vodnikova 9 nia estonta ejo

652. Milan Mesić	13,31 eŭroj
653. Ivica Krznarić	26,62 eŭroj
654. Lota Sambrailo	8,00 eŭroj
655. Spomenka Štimec	6,65 eŭroj
656. Esperanto Societo Rijeka anstataŭ floroj sur la tombo de Vjera Baletić	40,00 eŭroj

En novembro 2012 KEL kolektis 94,58 eŭrojn

**Ekde la jaro 2003 KEL kolektis inter siaj
membroj 27 522,59 eŭrojn.**

**Nia granda kredito de 50.500 eŭroj reduktiĝis al
9.977,30 eŭroj.**

Aliaj kaj lastaj kreditoj:

**Kredito al Esperanto-Societo „Trixini“
17.537,84 eŭroj.**

**Kredito al Esperanto-Societo Rijeka 2.464,15
eŭroj.**

Memorigo:

**Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova 9 en
2003, ni pagis por ĝi 108 000 eŭrojn.**

**Ni devis pagi aldone imposton de 5000 eŭroj.
Sume ni pagis 113 000 eŭrojn.**

Poezio

6. 12. 2001.

MIA ESPERO

Mia vivo estas malfacila
kaj mia futuro
ne ŝajnas brila.

Kun ĉiu nova tago
kelkaj miaj sonĝoj subakviĝas
kaj mia futuro pli malklariĝas.

Malgraŭ ĉio mi kredas en Dion
kiu havas ĉiun scion,
mi vere kredas ke Li havas manieron
solvi plej bone ĉiun aferon.
Mi scias ke Li uzas homojn kun boneco en iliaj koroj
kvazaŭ kuracilo por malbonaj aferoj
kaj ĉi-monde kaŭzantaj doloroj.

Mi vere kredas kaj esperas ke
Li iam miajn futurajn vojojn lumigos
kaj ke mia estonteco al mi malkovros
iujn ĝis nun nekonatajn mondojn
kaj al miaj nunaj demandoj donos al mi futurajn
respondojn.

Kara leganto
vi povas vidi el ĉi-tiu poemo
ke mi vere estas esperanto.

Goran Lakotić

Nota: Kara leganto, vi povas vidi el ĉi-tiu poemo ke mi vere estas esperanto.

Mortis verkisto JOŽA HORVAT

Prozisto **Joža Horvat**, kiu famiĝis per priskribo de siaj mondovojaĝoj, mortis en Zagrebo la 26-an de oktobro 2012.

Naskita en la plej norda kroata vilaĝo **Kotoriba** la 10an de marto 2015, **Horvat** eniris politikan vivon kiel arda komunisto. Apenaŭ absolviĝinta siajn studojn de filozofio, pedagogio kaj literaturo, **Joža Horvat** direktis sin en novembro 1941 *al la arbaroj, al la partizanoj* kaj partoprenis defendan militon kiel politika estro. Post la milito li estis redaktoro de pluraj kulturrevuoj, eldonejoj, dramaturgo, sekretario de literatura asocio...

Junulaĝe li eldonis sian unuan romanon **Sepa b** (Sedmi b) 1939. El la milita prozo plej konatas **Notoj pri la morto de Petar Arbutina** kaj romano **Kato kun kasko** (Mačak pod šljemom) kun la humura ĉefheroo **Ilija Kapara**. La romano estas tradukita en Esperanto de Zlatko Tišljar kaj restis neeldonita.

La filmo **Ciguli Miguli** por kiu li verkis scenaron en 1952 estis malpermesita ĉar politike netaŭga *pro ties etburĝeco*. Reage li direktis sin al la mondo sur sia velŝipo **Besa**. En 1973 aperis la samnoma dujara taglibro pri la vojaĝoj, pri la rilato de la homo kaj la maro. La familia tragedio revenigis lin el **Venezuelo** hejmen.

Horvat traveturis la mondon *en nuksoŝelo*, kiel li mem kutimis komenti, *sur la petalo de tilifolio*, kiel diris por li verkisto **Miroslav Krleža**. Dum la mondvojaĝo li perdis ambaŭ filojn. La tragedio de la verkisto naskis infanromanon pri la insuloj **Wa** kaj **Tapu** en **Wakajtapu** (Waitapu) gravan verkon de la kroata literaturo. Tiu verko estis en la centro de EU-projekto de KEL, financita de Eŭropa Unio, inter la jaroj 2008-2010. En tiu projekto **Malasree Dasgupta** tradukis la verkon



Zlatko Tišljar kun Joža Horvat

en la bengalan, je granda ĝojo de la aŭtoro. Jam pli frue en **Wuchan**, en **Ĉinio**, en la jaro **2005**, **Wakajtapu** estis eldonita en la ĉina lingvo, por festi la agadon de tradukisto **Hu Guozhu**.

Post **Besa** li veturis sur la ŝipo **Modra lasta**.

Lia lastaj verkoj pri la maro estas **Preĝo antaŭ la navigado** (Molitva prije plovidbe) el 1995, **Delfeno Dirk kaj Maldiligenta ĉevalino** (Dupin Dirk i Lijena kobila) 1997 kaj **Lumturo** (Svjtionik).

Lia aŭtobiografio aperis en 2005 sub la titolo **Atestanto de la preterpasado** (Svjedok prolaznosti).

Horvat estas unika figuro en la kroata literaturo. Li amikis al Esperanto kaj plurfoje gastis en kulturaj programoj de esperantistoj.

S. Štimec

Vjera Baletić (1928 – 2012)

Vjera Baletić naskiĝis en **Cerna** apud **Vinkovci** la 6-an de oktobro 1928 kaj mortis en **Rijeka** autune 2012. Profesie ŝi estis instruistino de geografio kaj historio. Esperanton komencis lerni dum siaj studentaj tagoj en Zagreb en la jaro 1950. Ŝi partoprenis sian unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Zagreb en la jaro 1953 kaj komencis instrui Esperanton en 1953 en **Vinkovci** en la Unua elementa lernejo. Poste ŝi daŭrigis la instruadon de Esperanto en **Novi Vinodolski** kaj ekde 1960 en **Rijeka**. En ŝiaj kursoj (inter 1960 kaj 1980) en elementaj lernejoj **Mateotti** kaj poste **Kozala** en **Rijeka**, partoprenis averaĝe 40 lernantoj ĉiujare. Ŝi ekzameniĝis pri B-ekzameno de Esperanto en 1964 kaj C-ekzameno en **Primošten** en 1972. En tiu periodo ŝi fariĝis delegito por urbo **Opatija** kaj fakdelegito de UEA pri historio kaj geografio. **Vjera Baletić** estis regula membro de Esperanto Societo **Rijeka** ĝis sia morto. Ŝi partoprenis kelkajn UK-ojn kaj helpis en realigo de diversaj Esperanto-aranĝoj en **Rijeka**.

Ekde sia esperantistiĝo, ĝis sia morto ŝi restis fidela al siaj idealoj inter kiuj ankaŭ al esperantismo.

V.M.

Draško Toplak (1937 – 2012)

Draško Toplak estis pentristo, instruisto pri pentroarto. Li naskiĝis en **Varaždin** la 2-an de aprilo 1937 kaj mortis en Zagrebo la 29an de aŭgusto 2012. Instruante en **Vinica** kaj poste en Zagrebo, li iniciatis Esperanto-kurson en **Elementa lernejo Mato Lovrak**. Li kreis desegnaĵojn por libroj de sia bofratino **Zora Heide Etulaj aventuroj**, kaj por ties svedlingva eldono **De små evntyrarna** samkiel por la poemkolekto **Nisam te zaboravila, grade**. La poemaro estis tradukita esperanten sub la titolo **Kantoj de l' silento**.

Li estis pasia montgrimpanto. Li abunde informadis pri Esperanto.

M. Toplak

Bonvenon al Zagrebo!



TURISMA ASOCIO DE LA URBO ZAGREB
Turisma Asocio de la urbo Zagrebo uzas Esperanton.

<http://www.zagreb-touristinfo.hr>
<http://www.zagreb-touristinfo.hr/?l=spe>